

Adam Mickiewicz,  
Czaty

Z ogrodowej altany wojewoda zdyszany  
Bieży w zamek z wściekłością i trwogą.  
Odchyliwszy zasłony, spojrzął z łoże swej żony  
Pojrzał, zadrżał, nie znalazł nikogo

Wzrok opuścił ku ziemi i rękami drżącemi  
Siwe wąsy pokręca i duma  
Wzrok od łoża odwrócił, w tył wyloty zarzucił  
I zawołał kozaka Nauma.

«Hej, kozaku, ty chamie, czemu w sadzie przy bra-  
mie  
Nie ma nocą ni psa ni pacholka?  
Weź mi torbę borsuczą i janczarkę hajduczą,  
I mą strzelbę gwintówkę zdejżm z kołka».

Wzięli bronie, wypadli, do ogrodu się wkradli,  
Kędy szpaler altanę obrasta.  
Na darniowym siedzeniu coś bieleje się w cieniu:  
To siedziała w bieleżnie niewiasta.

Jedną ręką swe oczy kryła w puklach warkoczy  
I pierś kryła pod rąbek bieleżny;  
Drugą ręką od łona odpychała ramiona  
Kłęczącego u kolan mężczyzny.

Ten, ściskając kolana, mówił do niej: «Kochana!  
Więc już wszystko, jam wszystko utracił!  
Nawet twoje westchnienia, nawet ręki ściśnienia  
Wojewoda już z góry zapłacił.

«Ja, choć z takim zapalem, tyle lat cię kochałem,  
Będę kochał i jęczał daleki;  
On nie kochał, nie jęczał, tylko trzosem zabręczał,  
Tyś mu wszystko przedała na wieki,

«Co wieczora on będzie, tonąc w puchy łabędzie,  
Stary łeb na twym łonie kołysał,  
I z twych ustek różanych i z twych liców rumianych  
Mnie wzbronione słodyczne wysysał.

...

Adam Mickiewicz,  
La vojevodo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En vespero somera vojevodo kolera  
Al la hejma kastelo rapidas;  
Al la lito edzina kun teruro senfina  
Li alvenas, – neniun li vidas.

En doloro brulanta kaj per mano tremanta  
Sian grizan lipharon li prenis,  
De la lito foriris, la manikojn retiris  
Kaj ektondris – kozako alvenis.

« Kial, best' abomena, mia pordo ĝardena  
Restas nokte sen hundo, sen gardo?  
Prenu tuj mian sakon kaj pafilon kozakan  
Kaj silente min sekvu, bastardo! »

Kun pafil' en la mano al ĝardena altano  
Ili ambaŭ sen bru' alŝteliĝas.  
Sur la benka herbaĵo ia lumas blankaĵo :  
En tolaĵo virino vidiĝas.

Unu manon levinte, la okulojn kovrinte,  
Per la dua forpuŝi ŝi penis  
Unu viron petantan, surgenue starantan,  
Kiu nun en la brakoj ŝin tenis.

Kaj en flama fervoro li parolis : « Ho, koro,  
Ĉu jam ĉio por ĉiam perdita?  
Eĉ la premoj de l' mano per la mon' de l'  
tirano  
Ĉiuj estas jam foraĉetitaj?

Mi vin tiel amadis, por vi tiel bruladis, –  
Malproksime nun plori mi devas;  
Li ne amis, ne ploris, nur per mon' eksonoris,  
–  
Kaj li ĉion por ĉiam ricevas.

Sur la brusto anĝela lia kapo malbela  
En dorloto de nun ripozados,  
De la roza buŝeto, de la ruĝa vangeto,  
Li ĉielan feliĉon suĉados.

...

«Ja na wiernym koniku, przy księżycu promyku,  
Biegę tutaj przez chłody i słoty,  
Bym cię witał westchnieniem, i pożegnał życzeniem  
Dobrej nocy i długiej pieśczoły!»

Ona jeszcze nie słucha, on jej szepce do ucha  
Nowe skargi czy nowe zaklęcia:  
Aż wzruszona, zamdlona, opuściła ramiona  
I schyliła się w jego objęcia.

Wojewoda z kozakiem przykleknęli za krzakiem  
I dobyli zza pasa naboje,  
I odcieli zębami i przybili stęflami  
Prochu garrsc i grankulek we dwoje.

«Panie - kozak powiada - jakiś bies mię napada,  
Ja nie mogę zastrzelić tej dziewczki;  
Gdym półkurcze odwodził, zimny dreszcz mię  
przechodził  
I stoczyła się łza do panewki».

«Ciszej, plemię hajducze, ja cię płakać nauczę!  
Masz tu z prochem leszczyńskim sakiewkę:  
Podsyp zapał, a żywo szczyść paznokciem krzesiwo,  
Potem palnij w twój łeb lub w tę dziewczkę.

«Wyżej... w prawo... pomału, czekaj mego wy-  
strzału,  
Pierwej musi w łeb dostać pan młody«.  
Kozak odwiódł, wycelił, nie czekając wystrzelił  
I ugodził w sam łeb - wojewody.

*Verkinto de tiu ĉi Pola poemo estas ADAM MICKIEWICZ  
(Adamo Mickjeviĉo, \*1789 – †1855).*

*Arg-1021-2066 (2014-05-23 10:35:56)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas en [http://www.oss.wroc.pl/  
mickiewicz/mj/autor001/text0089.htm](http://www.oss.wroc.pl/mickiewicz/mj/autor001/text0089.htm).*

Sur ĉevalo fidela, en vetero kruela,  
Mi rapidas al mia anĝelo –  
Por sopire foriri kaj al vi nur deziri  
Bonan nokton en lia kastelo . . . »

Ŝi silentas senmove; li komencas denove  
Ŝian plendon kun petoj kaj ploro,  
Ĝis, la brakojn lasinte, la konscion perdinte,  
Ŝi defalis al li al la koro.

En l'arbaĵo silente, aŭskultante atente,  
Staras ambaŭ gardantoj kovritaj,  
Ili staras genue, en la manoj senbrue  
La pafiloj ekstremis ŝargitaj.

« Estro »! diris kozako, « ia stranga atako  
Al mi ligas subite la manon;  
Brulan sentis mi larmon kaj skuantan mal-  
varmon,  
Kiam tuŝi mi volis la ĉanon. »

– « Pesto! mi vin jam skuos, mi vin plori  
instruos!  
Jen saketo kun pulvo : sen vorto  
Vi preparos, vi pafos, kaj se ŝin vi ne trafos.  
Mi edzigos vin mem kun la morto.

« Supren, dekstren, senskue! Mi ekpafos, –  
l'unue  
De l' amanto diskrevu la koro. »  
La servanto ektiris, kaj la kuglo eniris  
En la frunton de . . . lia sinjoro.

*Traduko de la Pola poemo "Czaty" de ADAM  
MICKIEWICZ (Adamo Mickjeviĉo, \*1789 –  
†1855) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZA-  
MENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-  
12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1021-2067 (2014-05-23 10:40:14)*

*Tiu ĉi Zamenhofs poemo-traduko troviĝas en  
[http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/  
librejo/0012/0008.php](http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php).*